

Intervjuo kun Perla Martinelli pri la 24a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-796/238, 1979 januaro 11 kaj 13

http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-34-/Radioprelego_796_SRI_238_1979_01_11_13_Intervjuo_kun_Perla_Martinelli_pri_la_24a_Internacia_Seminario_de_Germana_Esperanto_Junularo.mp3

Cl.- Vi aŭdas elsendon el Svislando. Claude Gacond intervjuas sinjorinon Perla Martinelli. Sinjorino Perla Martinelli, ekde kelkaj monatoj vivas nun en Svislando, tiel, se vi ricevis la revuon Kontakto, la revuon de TEJO, vi povis trovi prelegon de S-ino Perla Martinelli, indikite: 'Svislando'.

Sinjorino Perla Martinelli, vi partoprenis la 24an internacian seminarion, se mi ne eraras, de la Germana Esperanto-Junularo ĉi-vintre en Germanio. Kie ĝi okazis ?

PM.- En Dümmerlohausen, ĉe, proksime de Osnabrück, do sufiĉe en la nordo de Germanio.

Cl.- Kaj la temo de tiu seminario, se mi ne eraras, estis la Homaj Rajtoj.

PM.- Jes, teorio kaj realeco. Fakte oni klopodis diskuti, havi laborgrupojn ĉefe, kaj ankaŭ prelegojn, kompreneble, pri ĝuste la demando, ĉu la Deklaracio de la Homaj Rajtoj estas efektiva realaĵo aŭ restis nur surpapera utopio.

Cl.- Do internaciaj rilatoj kaj homaj rajtoj.

PM.- Jes.

Cl.- Kaj vi mem prelegis pri la internaciaj rilatoj dum la tricent lastaj jaroj ?

PM.- Jes, pli-malpli. Ekde la [traktato de Vestfalio](#) ĝis ĝuste la jaro de la [Deklaracio de la Homaj Rajtoj](#).

Cl.- Kaj do eble vi povas diri al ni, sur kiu bazo estiĝis do la internacia juro, la internaciaj rilatoj ?

PM.- Jes, do ni preterlasu ĉiujn vere tre malnovajn aferojn kaj mi povas diri, ke en la plej grava por la efektive internacia juro estis la verkoj de [Hugo de Grotius](#), kiu verkis en 1625 la ankoraŭ nuntempe plej gravan traktaĵon de internacia juro, tio estas: 'De Jure Belli ac Pacis'. Kaj ĝuste pro tio li estas taksata la kreinto de la internacia juro, de la normigo de la internaciaj rilatoj.

Cl.- Kaj la periodo posta, kiu sekvas, kio estas ?

PM.- Do, ni povas diri, ke ĝis la fama paco de Vestfalio post la 30-jara milito, ĉiam malgraŭ ĉiuj bonaj intencoj daŭris granda kaoso kaj malpaco en Eŭropo. Sed ĝuste por ni aparte estas interesa la dato, do 1648, de la paco de Vestfalio. Ĉar ĝi signas la komencon, ni diru, de iom pli individuaj homaj rajtoj. Ne nur gravega paŝo en la internaciaj rilatoj, sed ankaŭ iom pli da atento por la individuo. Do, vi scias, ke la milito ekestis komence pro religiaj konfliktoj. Kaj ĝuste pro la reguligo de tiuj religiaj demandoj, do ĉu la reformistoj aŭ protestantoj, kiel ni

povas nomi ilin havas la rajton libere praktiki sian religion, vivi sian religion, aŭ ne, ili devas sub-esti laŭ la volo de la (...) regas la homojn en iu determinita zono. Nu, la afero kompreneble tute ne povas esti en la sama nivelo de la deklaro de la homaj rajtoj, kiu okazis ekzakte post tricent jaroj. Tio estas, en 1948. Sed ni povas diri ke tie ni trovas la ĝermon de iu tre grava. Ne nur la ŝtato, la princo, la reĝo rajtas elekti siajn rilatojn kun aliaj ŝtatoj, sed la individuo mem komencas havi kelkajn tre etajn, sed kelkajn proprajn rajtojn. En la specifa kazo la rajton eventuale forlasi sian loĝlokon kaj transmigri al alia najbara ŝtato, kie li povas libere praktiki sian religion.

Cl.- Estas tio kio faris fine la diferencon inter Okcidento kaj la aliaj mondpartoj ĉu ne: la naskiĝo de la individua ekzisto-rajto.

PM.- Jes, kompreneble. Ĉar vi devas ankaŭ konsideri ke ĝuste kelkaj ŝtatoj, kiujn mi ne povas aŭ devas ĉi tie mencii, ĉar ĉiuj tre bone scias pri kiuj ŝtatoj mi parolas, ne povis fakte akcepti la Deklaracion, ĉar por ili la ŝtato havas ĉiujn rajtojn, do la ŝtato normigas la vivon de la civitanoj, dum en Okcidento kaj kiel ni diru parto de Okcidento, ĉar ne en la tuta Okcidento, oni konsideras ke la civitano tamen havas ĝuste individuajn rajtojn.

Cl.- Kio estis la evoluo de tiuj rajtoj, ni diru dum tiuj tricent jaroj, ĝis 1948 kaj kio okazis en 1948 ?

PM.- Do, la evoluo estas kompreneble tre malglata kaj malfacile ni povas diri ke estis periodoj sufiĉe prosperaj tiurilate, sed ofte oni faris paŝojn malantaŭen. Nu, vi demandas, kio grava okazis. Ni scias ke post la fino de la dua mondmilito prezidanto Wilson el Usono proponis la famajn dek-kvar-punktojn por la interpaciĝo. Kaj el tiu, ni diru ke la lasta estis la plej garava el ĉiuj, ĉar li proponis la starigon de iu daŭra asocio por la flegado de la paco. Kaj el tio ekestis la Ligo de Nacioj, kiu poste siavice donis la lokon al la Unuiĝintaj Nacioj. Do, estas bedaŭrinde konsideri, ke necesas militoj por ke oni alvenu al io grava ankaŭ por la bono de la individua civitano. Sed oni ne povas nei, ke se ne estus estintaj la, ĉefe la du mondmilitoj, eble kelkaj atingoj ne estus nun realaĵo.

Cl.- Vian prelegon sekvis en la seminario diskutoj de la junuloj. Kio estas ilia sinteno rilate al la homaj rajtoj ?

PM.- Nu, ni devas konsideri ke la seminario okazis en okcidenta Germanio, do en lando, kie la junuloj estas sufiĉe progresemaj kaj diskutemaj kaj kelkfoje eĉ disputemaj, sed en pozitiva senco. Do, mi sendube sentis tie tre grandajn diferencojn inter la pensmaniero de samaĝuloj, sed ĝenerale la etoso estis relative kritikema, sed entute ili devis agnoski ke la atingoj de la Deklaracio iam estos tre granda paŝo. Eĉ se bedaŭrinde kelkfoje ĝi restas iom pli teoria ol praktika afero, ni ĉiuj konsentis ke pli bone havi tamen indikilon al la ĝusta direkto, ol havi absolute nenion. Do, ni havu paciencon. Oni devas jam konsideri ke en la postaj jaroj aldoniĝis tiu baza deklaro pri la homaj rajtoj, la deklaro pri la rajtoj de la virino, poste pri la rajto de infano. Do, la vojon oni pluiras kaj tio estas grava.

Cl.- Vi aŭdis intervjuon el Svislando. Claude Gacond parolis kun Perla Martinelli. Ĝis reaŭdo!